BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL
Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul

PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 226-1298
70.000 – Brasília (DF)

NOVEMBRO/DEZEMBRO DE 1980 ÓRGÃO OFICIAL DO BKE BOLETIM Nº 58

REDAÇÃO: MARIA ALMADA



D-ro L.L. Zamenhof, kreinto de la Lingvo Internacia Esperanto - (1859 - 1917)

## LA 15-A DE DECEMBRO

Por ĉiu esperantisto tiu ĉi dato havas grandan signifon: naskiĝis la 15-an de decembro 1859, nia kara Majstro L.L. Zamenhof, kies idealon sekvas ni.

Ĉiujare la nombro de la sekvantaro de tiu genia homo kreskas. Esperanto ne estas nur internacia lingvo, sed ilo por la interkompreniĝo kaj interfraterniĝo de la popoloj. La brazilanoj omaĝos en la venonta jaro la plej elstrare nian Majstron dum la 66-a UK okazonta en Brazilio.

Estu ni ĉiam fidelaj al Zamenhof. Laboru ni por plibonigo de la vivo de la Homaro ĉar: "eĉ guto malgranda konstante frapante traboras la monton granitan" (Z).



Sur la foto estas de maldekstre, s-ino Klara Hess, Pastro Pedro Urbaitis, D-ro Ernani Dias Corrêa, Prof-ro F. S. Almada (parolante), Prof-ro Manoel Torres de Abreu Kaj la vicprezidanto de BKE, Majoro Gilberto A. Silva Velho, dum la prelego en la Universitato Rio Grande.

La oficiala oratoro de la I-a Sud-Brazila Renkontiĝo de Esperanto, estis d-ro Modesto Belmonte de Abreu.

Li diris:

"GE-SAMIDEANOJ"

VI ĈIUJ ALVENIS EL PLURAJ MALPROKSIMAJ PARTOJ DE NIA LANDO KAJ EĈ EKSTERLANDO, PARTOPRENI TIUN ĈI RENKONTIĜON KAJ TIAMANIERE, ELMONTRI VIAN AMON AL TIU GRANDEGA, BELA IDEALO, KIU, PERE DE NEŬTRALA LINGVO, CELAS KUNFRATIGI ĜIN KAJ PACIGI LA TUTMONDAN HOMARON KAJ ANKAŬ PLIBONIGI LA INTERNACIAN NIVELON DE ĈIUJ LANDOJ, LASANTE NETUŜEBLAN ILIAJN POLITIK-SISTEMOJN.

POR KE ESTONTE, ONI NE DIRU, EN TIUJ ĈI TEMPOJ DE RADIKALAJ SOCIAJ ALIFORMIĜOJ, KE NIA RENKONTIĜO CELAS POLITIKAJ INTERPRETADOJN, KLARE MI DEVAS DIRI, KE NIA OBJEKTO ESTAS NUR DESTINITA STUDI KAJ DISVASTIGI LA INTERNACIAN LINGVON ESPERANTO, PLUE, RESPEKTANTE LA REĜIMON KAJ ORDON REGANTAN EN NIA LANDO BRAZILO.

KELKIUJ ERARAS PENSANTE, KE ESPERANTO ESTAS RELIGIO. MI PENSAS, KE TIO OKAZAS PRO GRANDECO KAJ SUBLIMECO DE ESPERANTO-IDEALO, KIU ĜIN SIMILIGAS AL TIUJ DE RELIGIOJ. ESPERANTO NE ESTAS RELIGIO SED APENAŬ LINGVO, LOGIKE ELLABORITA POR REKTA INTERKOMPRENADO DE ĈIUJ POPOLOJ, KIU VERE ILIN ALPROKSIMIGAS, DANKE AL ĜIA FACILECO. - ESTAS LINGVO JAM TRE UZATA DE LA MONDO.

MALGRAŬ KE LA UNIVERSITATOJ KAJ LERNEJOJ DORMAS ANTAŬ ĜI, MI PENSAS KE IAM, ESPERANTO ESTOS AKCEPTATA DE ĈIUJ LERNEJOJ EN LA MONDO KAJ EĈ DE LA TUTMONDA ORGANIZAĴO U.N. (Unuiĝintaj Nacioj). - POR KONKERI TIUN FINAN VENKON, OBSTINE KAJ AME KAJ PACE BATALADAS ĈIU ESPERANTISTO.

EN TIU ĈI KUNVENO, EKSTER LA INTERFRATA ALPROKSMIĜO, ONI PRITRAKTOS TEMOJN RILATE DISVOLVIĜON DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO KAJ ANKAŬ ARANĜOJN KAJ PLIFORTIGADON DE, LA ESTONTA 66-a UNIVERSALA ESPERANTO KONGRESO EN LA, ĈEFURBO BRAZILIO, KIUN MI POVOS ANTAŬDIRI AL VI, ESTOS TONDRA SUKCESO.

ANTAŬ OL FINI MIAN PAROLADON MI, NOME DE LA ORGANIZANTOJ DE LA UNUA SUD-BRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO, ELKORE DANKAS VIAN ĈEESTON, DEZIRANTE FELIĈON KAJ AGRABLAN IMPRESON PRI NIA URBO PORTO ALEGRE KAJ ANKAŬ FRUKTODONAJN REZULTOJN POR ESPERANTO".

**EĤOJ DE LA SUDA RENKONTIĜO . . .**

La 26-an de septembro 1980, en la urbo Rio Grande (RS) estis inaŭgurita la busto de L.L. Zamenhof en la "Campus" de la Universitato Rio Grande. La solenaĵon partoprenis ĉirkaŭ kvindek personoj. Grupo de esperantistoj vojaĝis el Porto Alegre al Rio Grande por ĝin partopreni.

En tiu urbo aktivas D-ro Manoel Torres de Abreu, vicprezidanto de BKE. Li organizis la solenaĵon kaj prizorgis la intervjuojn kun la loka TV. Ĉeestis la inaŭguron esperantistoj el la urboj Pelotas, Caí (nia kunlaboranto s-ano Oto Vaske), São Leopoldo (s-ano Carlos Henrique Dionisio), kaj aliaj. Okazis interfraterniĝa vespermanĝo, vizito al la urbo, al plaĝoj kaj al muzeo.

La gazeto "Rio Grande" publikigis mesaĝon de niaj plej junaj gesamideanoj Jacqueline Madruga (11-jaraĝa) kaj Carlos Manoel de Abreu (9-jaraĝa). Ili klarigis al samaĝuloj kaj al pli aĝaj neesperantistoj kio estas Esperanto. Ambaŭ certe partoprenos la 66-an UK en Brazilio.

## BRAZILIO (FD)

L.K.K. - URĜE! - Estas vendataj belegaj glumarkoj pri la 66-a UK, aĉeteblaj ĉe la LKK; ĉiu folio enhavas 50 glumarkojn, prezo Cr$ 150,00. Adreso: - Carlos A. S. Cunha - Cx. Postal Nº 13-2088 - 70.000 - BRASÍLIA (DF). Ne forgesu, geamikoj, ke la nuna aliĝkotizo validas ĝis la fino de la kuranta jaro; poste ĝi altiĝos.

Ni konsilas al ĉiuj aliĝi ĝis la 31-a de decembro. La ne aliĝintaj kongresanoj ne havos eblecon partopreni la aranĝojn, ne aperos iliaj nomoj en la kongreslibro, ktp. - Volu, do, aliĝi al la unika sudhemisfera UK kaj pere de via ĉeesto grandigi kaj briligi ĝin.

Ĉies ĉeesto estas nepre necesa, ĉar nia UK estos unu el la plej belaj universalaj eventoj en la historio de Esperanto.

## KURSOJ EN BRAZILIO (FD)

Informas nin la ĝenerala sekretario de BKE, kaj de la LKK, prof-ro Nelson Pereira de Souza, ke li ek de septembro gvidas elementan kaj daŭrigan kursojn ĉe la universitato CEUB. Tio signifas, ke la direktoraro de BKE plene aktivas. Helpu ni al ili!

## UEA KOTIZOJ POR LA JARO 1981-A

La Ĉefdelegito s-ro Giuseppe Grattapaglia sendis al ni cirkuleron informante pri la jarkotizoj de UEA la venonta jaro:

Membro kun jarlibro (MA) . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Cr$ 1.300,00
Ricevas la revuon "Esperanto"
Membro kun jarlibro (MJ) . . Cr$ 520,00
Abon-kotizoj (Esperanto) . . Cr$ 780,00
Abon-kotizoj (Kontakto) . . Cr$ 390,00
Aldona-Pago (Societo Zamenhof) . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Cr$ 2.600,00

Gejunuloj, ĝis inkluzive 25j, ricevas senpage la revuon "Kontakto".

Adreso de s-ro Grattapaglia: - Cx. Postal numero 04-0097 - CEP 70.000 - Brasília (DF). La du reprezentantoj jam dissendis siajn cirkulerojn, kiuj pritraktas la saman aferon.

## HEROLDO DE ESPERANTO

La abonkotizo de tiu ĉi gazeto estas: Marvoje - Cr$ 750,00 kaj Aervoje Cr$ ... 1.000,00. Peranto: - Liga Brasileira de Esperanto. Praça da República, 54 - 2º - CEP 20.211 - Rio de Janeiro (RJ).

## PORTO ALEGRE (RS)

S-ino Izaura Sanguinetti prizorgas infanĝardenon, kiun partoprenas pli ol 30 geinfanoj. En la "Escola da Criança Ateira" la infanoj kantis por ni en la internacia lingvo. Gratulon al s-ino Izaura, kiu semas la Zamenhofan idealon en la korojn de siaj plej junaj geamikoj.

## GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis kaj dankas la jenajn, kiuj aperigas interesajn artikolojn pri Esperanto: ZET, el Jugoslavio; "Rio Grande", "Correio do Povo", "Correio Fraterno do ABC", "A Candeia", "A Nova Era", "Folha de Caçapava", Bulteno de Alagoas, Sekso kaj Egaleco kaj "Jornal da Furg".

## MONO RICEVITA

De la jenaj kunlaborantoj ni ricevis por helpi la eldonadon de nia Bulteno:

| | |
|---|---|
| Claudio Zimmermann | Cr$ 300,00 |
| Prof-ro Lauro J. de Oliveira | Cr$ 440,00 |
| D-ro Braz Cosenza | Cr$ 150,00 |
| De Prof-ro João B. Fonseca | Cr$ 100,00 |
| Libroj venditaj (F. S. Almada) . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | Cr$ 1.000,00 |
| | Cr$ 1.990,00 |

## S. SEBASTIÃO DO CAÍ (RS)

Nia vicprezidanto Oto Vaske informas nin, ke en la Spiritisma Societo "Alan Kardek", de tiu urbo, oni starigis krom la kurso pri Esperanto ankaŭ lego-

grupon. Tiel la ĵus finitaj kursoj daŭros pere de ekzercado de la lingvo, kio ja estas nepre necesa por ke la novbakitaj samideanoj ne restu "eternaj komencantoj". Imitinda agmaniero. Gratulon!

## "VERDA KAFO"

En la urbo Porto Alegre oni starigis monatan kunvenon nomatan "Verda Kafo", kie oni babiladas kaj praktikadas la lingvon dum trinkas kafon. Ĝin partoprenas elementoj el pluraj lokoj de la ŝtato Rio Grande do Sul. Jen alia imitinda afero grantulinda!

## CAÇAPAVA (SP)

Senlace kiel ĉiam, nia s-ano Silva Velho, vicprezidanto de BKE, el Caçapava, regule kaj aktive laboras por la plibonigo de la Esperanto-Movado en nia lando. Li kaj lia edzino, s-ino Gilca, partoprenas la esperantajn aranĝojn en Brazilo. Li helpas mone kaj per propagando eluzante plurajn metodojn - artikojn por gazetoj, cirkulerojn, korespondadon, vizitojn, ktp., tra la tuta Brazilo. Ĉe politikistoj amikoj, ĉe lernejestroj, ĉiam kun sukcesa laboro, Silva Velho elstariĝas ĉiam en la kunsidoj al kiuj li ĉeestas. Li estas unu el la plej efikaj idealistoj. Gratulon!

## SAN-PAŬLO (SP)

APE aĉetis novan sidejon, kiun ĝi intencas inaŭguri antaŭ la fino de la jaro. Cirkulero pri la evento estos dissendata siatempe.

Pluraj kursoj ekzistas en tiu laborema organizo kaj ka plej bona lernanto, ĝis 20-jaraĝa, ricevos premion: - Vojaĝo al la 66-a UK de Brazilio.

Estis disdonitaj diplomoj al la gekursanoj de Prof-ro Valdomiro Moreira. Ni gratulas.

## VOLTA REDONDA (RJ)

D-ro Alberto Flores informis nin, ke du junaj instruistoj gvidas kursojn kun sukceso en la spiritismaj medioj de tiu progresema urbo. Estas laŭdinda la klopodo de la junuloj de Volta Redonda.

## RIO DE JANEIRO (RJ)

La Kultura Kooperativo de Esperantistoj informas, ke ĝis la okazigo de la 66-66-a UK intencas eldoni la jenajn librojn:

Curso Pratico de Esperanto (Szilági) - 7-a edição; Dicionário Esperanto-Português Ilustrado (bolso) - Pandiá Pandu; "A Bagaceira" - José Americo de Almeida (Academia Brasileira de Letras) - Tradução para o Esperanto do Prof. Geraldo Mattos; Rompitaj Flugiloj - (Ĝibran) - Tradução do Árabe para o Esperanto de Georgo Abraham; Alimentação Ideal, Martins - Tradução do Esperanto para o português, de Cedilha Neto; Grande Dicionário Esperanto-Português - Ismael Gomes Braga - 3-a Edição; e Como Cozinhar Sem Carne - Clara Hess.

## NIA MOVADO EN LA JARO 1980-A

La preparado por la 66-a UK en la venonta jaro en Brazilio devigis niajn gesamideanojn vigle agadi.

En la monato januaro okazis la Junulara Renkontiĝo en Sorocaba (SP). En aprilo, la 1-a Kongreso de la Brazila Konsilantaro de Esperanto en Juiz de Fora (MG).

Komance de julio organizis la Garanhus Esperanto-Klubo Nordorientan Renkontiĝon. En la sama monato multaj esperantistoj partoprenis la 2-an Latinamerikan Kongreson en Argentinio. Sep personoj el Brazilo partoprenis la 65-an UK'on en Svedio. En la pasinta septembro BKE kune kun ESPA - Esperanto-Societo de Porto Alegre (RS) organizis la 1-an Sud-Brazilan Renkontiĝon en Porto Alegre kaj inaŭguris la buston de Zamenhof en la urbo Rio Grande (RS). En novembro APE, en San-Paŭlo, organizis la 6-an Regionan Renkontiĝon en Piracicaba (SP).

Dum ĉiuj kunvenoj oni varme propagandis pri la 66-an UK kun sukceso. Tra la tuta lando estas organizataj pluraj kursoj pri la internacia lingvo. Multaj esperantistoj aktivas nun, eĉ tiuj, kiuj aktivis antaŭe. Pluraj bonaj esperantistoj revenis al nia movado dum la lastaj 5 jaroj, kaj kun granda ĝojo ni rimarkas, ke multaj virinoj okupas gvidpoziciojn, kio antaŭe ne okazis.

Volinte rekoni la klopodojn de niaj samideaninoj, kiuj ŝultro-ĉe-ŝultro, kune kun viroj laboradas por la Zamenhofa idealo. La listo de la nomoj de la plej elstaraj virinoj estas la jena: 1) Elvira Fontes, prezidantino de APE, kursgvidantino, organizanto, ĵurnalisto, ktp.; 2) Francisca Martos, kiu instruas ĉe APE; 3) Nydia Krieger, kursgvidanto kaj organizanto; 4) Denise Arneiros Deslandes, instruas la lingvon kaj subtenas la organizaĵon Barra Mansa Esperanto-Klubo; 5) Weima Watson Renault elstariĝis dum la 1-a Kongreso de BKE, en Juiz de Fora, prizorginte la junularon; 6) Espedita Feitosa, novbakita esperantistino, kiu jam instruas la lingvon en Curitiba (PR); 7) Balbina Ferreira, instruas kaj aktivas en Niteroi (RJ); 8) Julia Junqueira da Cunha subtenas la movadon en Uberaba kaj helpis BKE; 9) Maria do Socorro Monteiro, organizis kunlabore kun Garanhus Esperanto-Klubo la Renkontiĝon tie okazinta ĉijare; 10) Neima Adôrno, junulino, membro de LKK por la 66-a UK; 11) Gilca Silva Velho, subtenas la movadon kune kun sia edzo; 12) Izaura Sanguinetti unu el la organizantoj de la Sud-Brazila Renkontiĝo en Porto Alegre; 13) Ursula Grattapaglia, direktorino de UEA, loĝanta en Brazilo; 14) Cedilha Neto, sekretariino de KKE.

Pro manko de informoj ne eblas al ni mencii aliajn aktivulinojn, kiuj certe ekzistas en nia Brazilo. Ni gratulas al ĉiuj kunlaborantinojn kaj dankas al ili la senpretendan helpon.

**VI-A SANPAŬLA ESPERANTO-RENKONTIĜO**

Dum la 22-a kaj 23-a de novembro, 1980, okasis la evento en la ĉarma urbo Piracicaba (SP).

Estas aparte menciinda la klopodo de du junuloj, kiuj studas en tiu univesitata urbo, kie ankoraŭ ne ekzistas ia ajn Esperanto-movado. Temas pri Marcos Zlotovich kaj Marcelo Urbano Ferreira.

En la granda salono de la "Centro Academico Luiz de Queiroz" ĉeestis la solenan malfermon la reprezentanto da la respektinda episkopo, la kanoniko Eduardo Kvock, la reprezentanto de la Akademio Luiz de Queiroz, la prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto, Prof-ro F. S. Almada, la prezidantino de San-Paŭlo Esperanto Asocio, Prof-rino Elvira Fontes, sub kies gvidado realiĝis la Renkontiĝo.

Pluraj societoj el la sekvantaj urboj fariĝis reprezentataj per elementoj elstaraj, inter kiuj troviĝis: el São Miguel Paulista (SP) - D-ro Oswaldo Pires de Holanda (oficiala oratoro); Bauru (SP) - Prof-ro Ivon Barbosa (unu el la prelegintoj); Promissão (SP) - Lair Alves Moreira; Caçapava (SP) - Majoro Gilberto A. Silva Velho; Sorocaba (SP) - Prof-ro Manoel Blaz Garcia; El Campinas, Rio Claro, Votuporanga, Santos, Mogi das Cruzes kaj el São Paulo mem, kiuj per malgranda parolado salutis la ĉeestantaron.

La renkontiĝon ne partoprenis amaso da geesperantistoj sed altkvatitaj aperis pluraj elementoj, kiuj entuziasme debatis la temojn utiligitajn; ĝi estis kvazaŭ seminario de profesoroj, kursgvidantoj aŭ estroj de iuj organizaĵoj.

La ĉefa celo estis: propagandi pri la internacia en tiu universitata urbo, vekigante la atenton de centoj da studentoj pri Esperanto, kaj sam tempe pri la 66-a Universala Kongreso, okazonta en Brazilio venontjare, krome, inteŝanĝi opiniojn pri gramatikaj malfacilaĵoj.

Estis ankaŭ priparolita la venonta VII-a Renkontiĝo, kiu okazos en Campinas (SP), kie iam ekzistis forta Esperanto-movado, nun tre modesta.

Aktivas tie la junulo João Manoel Aguilera Jor., kiu lernis Esperanton en Bauru kun Prof-ro Antonio João Fraga Padilha, konata kaj estimata instruisto pri Esperanto. S-ro Ronaldo Gomes da Silva, prof-ro pri angla lingvo, en Campinas lernas nun la internacian lingvon kaj ambaŭ, kune, intencas reorganizo la movadon kaj ĝin vigligi en tiu grava univesitata urbo.

Plezure ni konstatas, ke en pluraj urboj neatendite ekagadis la junularo. En Curitiba (PE), Votuporanga (SP), Campi-

nas (SP), Piracicaba (SP), Santos (SP), Volta Redonda (RJ), Barra Mansa (RJ) kaj Brazilio (FD). Ni fidas je niaj anstatauobtoj. Antaŭen!

**L.K.K. - Brazilio (FD)**

Laŭ informo, kiun sendis al ni UEA, jam aliĝis al 66-a UK, ĝis pasinta oktobro, ĉirkaŭ 700 personoj el 43 landoj.

**NOVA VICPREZIDANTO - MOGI DAS CRUZES (SP)**

Invitita de nia prezidanto partopreni la kadron de niaj vicprezidantoj s-ano Euclides Carneiro da Silva, poeto aŭtoro de "Vida, Amor e Juventude", el Mogi das Cruzes, konsentis pri lia partopreno kaj elektis la fakon "Literaturo". Elstara samideano, s-ro Silva prizorgas nuntempe la organizadon de AME - Asocio Moĵiana de Esperanto, kun instruado de la Internacia Lingvo al pluraj interesatoj de Mogi.

S-ro Silva estas prof-ro pri pluraj lernobjektoj en la Universitato de Mogi das Cruzes, inter kiuj estas: Lingvoj Portugala, Latina, Romanika Filologio, Literaturo Latina, Portugala, Brazila.

Ni esperas, ke lia laboro multe helpos la movadon en tiu regiono.

**LA ĜIBULO**

Li ricevis, la ĝibulo, anoniman amleteron, inviton al rendevuo. "La kvinan de aprilo, sabate, je la sepa vespere, venu al la ĝardeno ĉe la Templo-placo! Mi estas juna, riĉa, libera kaj-ne valoras prisilenti - delonge simpatias al vi. Plaĉas al mi via nobla, saĝa frunto, via soleco ... Miaj rimarksignoj: - "Griza angla kostumo, en mia maldeskstra mano silka, siringe viola ombrelo", ktp., ktp.

Kiel kortuŝita li estis, kiel li atendis la sabaton: la unua amletero en lia tuta vivo! Sabate li vizitis la friziston, aĉetis novajn gantojn, novan kravaton; hejme belvestante sin antaŭ la spegulo senfine li ĉirkaŭligis la kravaton per siaj longaj, maldikaj fingroj malvarmaj kaj tremantaj. Poste, belvestita li sidiĝis en la apogseĝon - Kiel gasto, kiel fremdulo en sia propra loĝejo, kaj komencis atendi la fatalan horon, leviĝis tamen sindetene, ne rapidante surmetis en la vestiblo printempan ĉapelon, prenis la promenbastonon kaj malrapide eliris. Sed sur la strato pli jam ne povis sin regi - li ekpaŝis per siaj longaj kaj maldikaj kruroj pli rapide, kun la tuta incita graveco karakteriza por la ĝibulo. Kiam li rapide eniris la ĝardenon apud la templo, li subite ekŝtoniĝis sur la loko: renkonte al li, per gravaj kaj longaj paŝoj iris en griza kostumo kaj beleta ĉapelo, kun ombrelo en la maldekstra mano kaj kun violoj en la dekstra - ĝibulino! Dio! Ju estas senindulga al mi!

**LINGVA PRIKOMENTO**

D. W. - Argentinio

"Lia mano karese glitis super la blondan hararon de la knabo". Stranga kareso estas kiam la mano glitas, sed ne tuŝas la hararon. Ĉar la vorto "super" signifas, ke la du aferoj (en ĉiu tiu okazo la mano kaj la hararo) ne tuŝas unu la alian. La ĝusta vorto ĉi tiu estas ne "super" sed "sur". "La parencoj sekvis lian vojaĝon per varmaj bondeziroj". La prepozicio "per" ĉi tiu ne taŭgas. La ĝusta vorto estas "kun". "Baŭmi" ne estas oficiala vorto, sed ĝi ŝajnas akceptinda neologismo, ĉar "obstinstariĝi" estas malbela kombinaĵo, kaj oni ja bezonas vorton por esprimi ĉi tiun agon de la ĉevalo. La akso spegulas renverse la objektojn". En ĉiu tiu frazo la vorto "renverse" ne estas ĝusta. Ni diru: "La akvo spegulas inverse la objektojn". Bone estas diri: "Mi inversigis la bildon". Signifas mi metis ĝin en inversan pozicion, aŭ en inversan direkton. Ekz.: "Li metis la elektran fluon inversige". Renversi: faligi ion aŭ iun starantan. Ekz.: "Sur mia skribotablo mi renversis la inkujon" aŭ "En mallumo mi reversis la seĝon", aŭ "La popolo renversis la ministraron". "La tablo straras malrekte kaj baldaŭ renversiĝos". "Post tiu pago mi estos senŝulda al vi". En tiu ĉi frazo la vorto "senŝulda" ne estas ĝusta. Ni diru: ". . . mi estos kvita al vi". Kvitigi: "Mi kvitigas vin de la resto de via ŝuldo". (Fari iun kvita). "Primeditu la sekvojn de via ago". La vorto "primeditu ne estas klara. Ni diru: "Konsideru la sekvojn de via ago". (En senco: atente ekzameni).

## DOMINAR O ESPERANTO

Eleus de Sá

*Falamos língua adversa,*
*Castigo por ambição.*
*Tempo de vida pregressa,*
*De simples recordação.*

*Querendo com toda pressa*
*Atingir toda amplidão,*
*Assim Deus, p'rá cortar essa*
*Confunde nossa razão.*

*Porém, avisa o profeta,*
*Assim indicando a seta.*
*É profecia de santo.*

*Se unirão todos um dia*
*Quando com muita alegria*
*Dominarem o Esperanto*

## LA SCIVOLEMA JUNULINO

Kantadi junulino lerni deziris,
kaj kison kun ĉiu noto, ŝin mi donadis.
Ŝi lernis tiom, ŝi lernis tiom,
aferojn multajn lernis, sed ne la kanton,
sed ne la kanton!

La nomojn de la steloj ŝi volis lerni,
kaj kison kun ĉiu nomo, al ŝi mi donis.
Ho! bela nokto, ho bela nokto!
Ĉar mi inventis nomojn por ĉiu stelo,
Por ĉiu stelo.

Tiel la nokto finiĝis, tagiĝo venis,
foriris la steloj, sola ŝi restis.

Kaj min ŝi diris, kaj min ŝi diris:
"Kial steloj mankas dum sun'lumigas,
Dum sun' lumigas?"

(Kantaĵo de nekonata aŭtoro -
Tradukis A. Barrocas - Urugvajo).

## SALVADOR (BA)

S-ano José Saraiva Matos, nia vicprezidanto, informas, ke li organizis en Salvador "Esperanto-Studgrupon" ĉe Spiritisma Federacio de Ŝtato Bahia. La organizantoj estas: D-rino pri psikologio Ruth Brasil Mesquita kaj li mem.

La Esperanto Studgrupo titoliĝas "Zamenhof". Ĝi havas la sekvantajn Membrojn Gelernantojn: Aldeira de Souza Xavier, Aldaci de Souza Xavier, Asterio de Souza Xavier, Edson Fernandes Arapiraca, José Carlos de Araujo, Raymundo José Dutra, Samuel Ferreira Urpia, Solange Maria Lopes, Washington da Encarnação Kaj Raymundo Queiroz.

## KRISTNASKO

Alvenis denove la plej bela festo de la kristanoj: la naskiĝtago de Kristo. Keĝi alportu al ni ĉiuj en la mondo, amon, pacon, feliĉon. Ke la batalanta homaro ĉesu malami unuj la aliajn. Ne mortigu la fratojn ĉar ni ĉiuj estas filoj de la sama Dio. Al niaj geamikoj kunlaborantoj, eĉ nekonataj, ni deziras feliĉan Kristnaskon kaj tre prosperan Novjaron!

La estraro de BKE.


## ENCONTRO CULTURAL

Recebemos da Associação Cultural Luso-Brasileira, de Juiz de Fora (MG), especial convite para o "Encontro"que comemorará o 25º ano de sua fundação, do qual faz parte nosso coidealista Kleber Halfeld, um dos 13 poetas que figuram entre os participantes do evento. Felicitamos a todos, desejando prosperidade à Associação.

## SANTOS (SP)

**ESPERANTO-KURSO** - En la Spiritisma Societo Ismenia de Jesus s-ano Pedro Cavalheiro starigis Esperanto-Kursonal kiuj aliĝis cirkaŭ 40 gelernantoj.

**PINGO DE LUZ** - Tiu ĉi librovendejo venadas "Esperanto Elementar", à Av. Marechal Deodoro, 11 - CEP 11.100 - Santos (SP).



Sur la foto vidiĝas D-ro Modesto Belmonte de Abreu (staranta), pastro Bruno Ostropolski, el Argentinio kaj inĝeniero Alberto Barrocas, el Urugvajo, dum la malfermo, de la 1-a Sud-Brazila Renkontiĝo de Esperanto.



S-roj Carlos A. Siqueira da Cunha, membro de la L.K.K. por la 66-a UK, kaj Gilberto A. Silva Velho, vicprezidanto de BKE, niaj bonegaj kunlaborantoj, dum la solena malfermo de la 1-a Sud-Brazila Renkontiĝo de Esperanto, en Porto Alegre (RS).



Sur la foto estas de dekstre: Prof-ro Fernando Lopes Pedone, rektoro de la Universitato Rio Grande, Prof-ro Manoel Torres de Abreu (parolante), s-ino Klara Hess (argentinanino) kaj reprezentantoj de la Radio kaj TV, ĉe la busto de Zamenhof, en Rio Grande (RS).